

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Liono, ĝemela urbo de Jokohamo

Jen estas pri Liono, unu el la ĝemelaj urboj de Jokohamo.
Ni petis lionan esperantiston prezenti la urbon.

Thierry Tailhades

Liono estas nun la dua plej granda urbo en Francio, kaj ankaŭ unu el la plej malnovaj, ĉar ĝi oficiale estis kreita de la Romianoj en 43 AK, tio estas antaŭ 2059 jaroj. Tial videblas en Liono romiaj ruinoj. Kvankam oni parolas pri ruinoj, la teatro estas en sufiĉe bona stato, kaj en ĝi okazas ĉiujare somera festivalo.



Romia Teatro

Liono rapide kreskis kaj disvolviĝis, ĉar ĝi lokiĝas sur la bordoj de riveroj Rodano (Rhône, ローヌ川) kaj Saono (Saône, ソーヌ川), kiuj estis, kaj daŭre estas, konvenaj komercaj vojoj inter suda kaj norda Eŭropo. La malnova

kvartalo de Liono, kiu datiĝas de Renesanco enhavas multajn belajn domegojn, kiuj rememoras la riĉecon de la lionaj komercistoj en tiu epoko. Tie ankaŭ staras la belega katedralo Sankta-Johano de Matenkantoj (12-a jarcento), kies episkopo estas la ĉefo de la franca katolika eklezio.

En la 16-a jarcento aperis en Liono fabrikado de silkaĵoj, pri kiuj la urbo dum longe famiĝis en la tuta Eŭropo, kaj en 1804 en Liono aperis la unua ĵakardo, teksmaŝino inventita de la lionano "Jacquard" (ジャカール). Iom post iom la silkfabrikoj instaligiĝis sur unu el la du montetoj de Liono, kies nomo estas



Katedralo kaj Baziliko

“Ruĝema kruco” (Croix-Rousse クロワールーヌ). En tiu kvartalo daŭre videblas domoj de tiu epoko, kiuj havas tre altajn plafonojn necesajn por la ĵakardaj teksmaŝinoj. Tiuj domoj ofte enhavas trapasejojn, kiuj ebligas iri de strato al alia strato. Tiuj trapasejoj estis tre utilaj al la silklaboristoj, kiam ili ribelis en la jaroj 1830-aj, pro falego de la prezoj de silkaĵoj.

Poste estis konstruitaj en Liono aliaj notindaĵoj, kiel la urbodomo renovigita de François Mansart (フランソワ・マンサール 18-a jarcento) kaj ties fontano kreita de la skulptisto Bartholdi (バルトルディ), tiu mem, kiu konstruigis la Statuon de Libereco (自由の女神像) en Novjorko.

Nuntempe Liono famas pri sia kuirarto, kaj estas ofte nomata “gastronomia ĉefurbo”, tial en la urbo troviĝas multaj

restoracioj, en kiuj oni povas elekti tradiciajn lionajn manĝaĵojn. Alia specialaĵo de la urbo estas la pentritaj muroj. Ekzistas ĉirkaŭ centoj da tiaj muroj; la plej fama estas la tiel nomita “Muro de la Lionanoj”, kiu prezentas la lionajn famulojn, inter aliaj: la romia imperiestro Klaŭdio, Jacquard, kaj Saint-Exupéry (サン = テグジュペリ) la verkisto de La eta Princo (星の王子さま), kies statuo troviĝas ĉe la flanko de la granda placo Bellecour (ベルクール広場) la plej granda placo por piedirantoj en Eŭropo.

Tiuj, kiuj volas vidi panoramon de la tuta urbo povas uzi la kablotraĵon, kiu kondukos ilin al monteto de Fourvière (フルヴィエール), kie ili povos ankaŭ viziti la bazilikon, kaj, se la vetero permesas, vidi ĝis la Monto Blanka (モンブラン).



101a Legokunsido

En la 5a de decembro, ni havis la 101an Legokunsidon por “Kredu min, sinjorino!” de Cezaro Rossetti, kaj ok personoj partoprenis.

Ĉarma verko, Ĉarma bazarulo

Aida Yayoi

Oni povas facile kaj glate legi ĉi tiun verkon kun intereso de la komenco ĝis la fino, kvankam mi mem sentis ioman enuon survoje, sed ĉiuokaze tiu karaktero de la libro estas kredeble la plej granda merito admirinda.

Kial Cezaro Rossetti, la aŭtoro, povis verki tiel facile legeblan, interesan libron? La respondo estas simpla; ĉar ĝi estas aŭtobiografia libro, la aŭtoro ne bezonas nove serĉi temon

kaj materialon. La rolo de aŭtoro estus nur atendi la tempon por komenci. Post iom da aranĝo ĉio farenda estus priskribi libere la konatan mondon. Kompreneble necesas kribri la materialojn, sed tio estas malgranda peno kompare kun la kompleksa tasko de fikcia verkisto.

Laŭ la kuraĝigo de sia amiko, Cezaro komencis skribi. Sekvante la skribmanieron li skribis “nature kaj senĝene, kvazaŭ kiel rakonto en amika rondo”. Kaj kiam naskiĝis la ĉarma verko, R. Schwartz laŭde komparis ĝin kun bona vino.

La verko traktas la vivon de eksponisto, alivorte bazarulo, kiu tie kaj tie migrante vendas varojn en foirejoj per improviza, pli-malpli ĉarlatana lertlango.

Ĉi tiu aŭtobiografia romano altiris grand-nombran legantaron. Laŭ la frato Reto Rossetti 20 000 ekzempleroj elĉerpiĝis en Hungario unumonate. Cezaro en sia eksponista kariero senĉese pensis kiel envenigi laŭeble multajn aĉetantojn. Kun sperta taktiko kaj refleksebla spirito li ĉiam serĉis elirejon el malfacilaj situacioj dum la ekonomia stagno. Tiuj spirito kaj taktiko speguliĝis en lia verko. Tio verŝajne estas ĉeffaktoro ĉarmi legantojn. Lingva alteco subtenita de elokventa stilo, trafaj vortoj, spritaj frapfrazoj ankaŭ estas atentinda.

Cezaro skribis Esperanton bone kiel sian propran lingvon. Li eksciis Esperanton en sia juneco. Pro malfavoraj cirkonstancoj en tiu tempo li amikiĝis kun kosmopoliteca etoso. Mi ne scias ekzakte, sed li frekventis kunvenojn de Esperanto, iufoje kun ironia vidpunkto. La epizodoj koncerne Esperanton estas interesaj. Bedaŭrinde li mortis tre frue.

Kredu min, sinjorino!

Mizro Iwaya

Migrantaj vendistoj, alinomataj bazaruloj, vendas varojn per sia lango. Tial ilia lango funkcias tre bone. Ili parolas pri sia varo ke la aŭskultantoj ekkredas ĝin vere ideala. Tia talento estas, krom la denaska karaktero, longe hardita kaj polurita dum la praktiko antaŭ publiko.

Tiu ĉi aŭtoro faris frazojn ĝuste laŭ tiu tekniko. Ĉiu esprimo estas klara kaj sprita. Interesaj epizodoj aperas unu post la alia. La ĉefheroo de la rakonto estas la aŭtoro mem. Li unue estis kuiristo, sed baldaŭ li rezignis ĝin kaj komencis vendi kuirilon. Nature la unuaj vendopenoj estis forpelitaj antaŭ la pordoj de dommastrinoj. Sed li persistis en ĝi kun bone cerbumitaj taktikoj kaj eksukcesis vendi iom post iom. Tia klopodo bone hardis lin al granda bazarulo dum jaroj.

Mi vidas ke la historio mem estas interesa. Samtempe rimarkinda estas lia stilo. Longe hardita esprimkapablo prezentas sin ofte en amuzaj scenoj. Migra vendisto, la aŭtoro, faras


multe da vojaĝoj. Li spertis multe da interesaj okazaĵoj. Ankaŭ liaj kolegoj estas samaj. Do li ankaŭ aŭdas same interesajn rakontojn. Tial lia parolado daŭras kaj daŭras sen interrompo.

Domaĝe li mortis antaŭ kvindek-jara aĝo. Se ni povintus legi pli da verkoj liaj!

Rakonto de “7 faloj, 8 ekstaroj”

Sibayama Zyun’iti

En tiu ĉi romano, la ĉefrolulo “mi” komencas sian karieron preskaŭ nula, tamen kun kuirista sperto, “7 fojojn falas kaj 8 fojojn ekstaras” laŭ japana proverbo, iom post iom altigas sin. Kaj laŭ enkonduko kaj epilogo al la libro, oni scias, ke tiu “mi” ja estas mi, la aŭtoro mem. Tiom bedaŭrinde la juna morto de Cezaro Rossetti, la aŭtoro en la aĝo de 48.



Mi esperis, ke kun Anna, kunlaboranta en la komencaj “ekstaraj tagoj” kun sufiĉa sukceso, “mi” havos daŭre pacan hejmon, sed ne tiel estis...

Ĉi tie oni povas legi, kiel “mi” kaj liaj kamaradoj aŭ konkurencantoj sukcesas kredigi bonajn sinjorinojn kaj sinjorojn je la boneco de siaj vendaĵoj, aŭ malsukcesas je tio, blufete, blufe aŭ blufege. Iuj krimas laŭ la nuna (eĉ tiama) kriterio. Sed mi vidas virton en tio, ke “mi” mem ne falas en krimon.

Jen pri kelkaj vortoj. En la 3-a eldono en 2012, kiun mi legis, estas glosa kun pundo - ŝilingo - penco, kio ja helpas al ni. En la glosaro estas “riz-kareo”, sed tio ne necesas al ni japanoj. Fakte, kaj “mi” kaj la aŭtoro iam vivis en Hindujo. Por japano, la vortuzo ‘kuniklodomo’ por malgranda domo en la ĉapitro 7 estas pensiga. Ĉar en 1979, eŭropa raporto pri japana loĝkondiĉo uzis vorton, kiu japanigite fariĝis “usagi-goja”, t.e. kuniklodomo, por moketi pri la malgrando de la domoj por japana popolo.




desegnis s-ino Miyazaki Hideko

La 45-a Zamenhof-Festo en Kanagaŭa, Japanio

Sibayama Zyun'iti

Esperanto-Ligo de Kanagaŭa (por la 4 aktivaj E-rondoj en la gubernio Kanagaŭa) komune okazigis la 45-an Zamenhof-Feston posttagmeze en la 6-a de decembro 2015, en la urbo Huzisaŭa, meze de la gubernio. Ĝin partoprenis 43 homoj, inkluzive de 6 homoj el ekster esperantujo.

La plej granda karakterizaĵo ĉi-jara estis publike malfermita prelego de s-ro Hori Jasuo, nia bardo, en la komencaj 90 minutoj de la 1-a ptm. Li (en la japana) parolis, kial kaj kiel li esperantistas, kaj kion li faris kaj faros por diskonigi la nordorient-japanan katastrofon 2011-an per cunamo kaj atomcentrala akcidento al la mondo pere de Esperanto. Fine de la prelego, kanto-grupo kantis japane kanton "Rekviemo" al la katastrofaj forpasintoj, kaj poste la grupo kantis tion Esperante.



S-ro Hori pri Esperanto-Sumoo



Post ripozo, de 14h45min, komenciĝis la esperantista parto, sub la prezido de s-ino Take Masako el Huzisaŭa. Notinde, tiun parton observis du studentinoj, kiuj utiligos sperton de tia esperantujo por sia raporto. En tiu parto, post la prezento de la 4 rondoj, la 100-a UK en Lillo estis projekcie prezentita de s-ro Suzuki Keiichiro de nia rondo. Sekvis bildorakontado (ne projekcie sed per mane faritaj bildofolioj) de Huzisaŭa-anoj pri "Enoŝima" — historiĉa insulo en la urbo.



La Projekto Eroŝenko 125 estis prezentita, nome pri blinda rusa esperantisto-literaturisto Eroŝenko naskiĝinta antaŭ 125 jaroj, de Sibayama Zyun'iti kaj Murata Kazuyo. Jen kanto "Rekviemo", kaj la kanto-grupo gvidis, ke ĉiuj kune kantu la himnon "La Espero". Esperantaj libroj estis prezentitaj por vendo fare de s-ino Doi Ĉieko. La verda standardo estis transdonita al s-ro Okucu Ŝintarou, la membro de Odaŭara, kiu venontjare organizos la Zamenhof-Feston. "La Tagiĝo" fermis entute 4 horojn kaj duonon da programo bunta kaj varia.



En Restoracio Nakamura-ya

Memore al la lasta evento de Projekto “Eroŝenko125”

Murata Kazuyo

En la 23a de decembro 2015, okazis kunsido omaĝe al la datreveno de la forpaso de Eroŝenko en 1952. 36 personoj kolektiĝis en la restoracio Nakamura-ya (en Tokio), kie antaŭ ĉirkaŭ 100 jaroj Eroŝenko loĝis laŭ helpo de s-ino Souma Kokko kaj la edzo, kiuj kune mastris la restoracion.

La du trionoj el la 36 personoj venis de blindula societo kaj Esperantujo, kaj aliaj venis per invito de s-ino Tanaka Yasuko (foto **1**), filino de bedaŭrata s-ro Takasugi Ichirou, kiu klopodis famigi Eroŝenkon per la eldono de la verkaro de Eroŝenko kaj verkado de lia biografio.

Inter la gastoj troviĝis 3 raportistoj el ĵurnaloj por blinduloj, tial poste aperos iliaj artikoloj pri la kunsido.

La unua programero estis prezento de “La historio de Nakamura-ya kaj Eroŝenko”, farita de la membro de la Informa Sekcio de tiu kompanio.

La dua estis ludo de balalajko, “popolkantoj de Rusio” kaj “Monto de Manĉurio” (kiujn siatempe certe ludis Eroŝenko). Poste ni frandis pladon de kareo, kaj babilis.

Finonte pladon, ni aŭskultis bonajn prelegetojn. Unue s-ino Tanaka Yasuko parolis ĉefe pri sia patro Takasugi Ichirou, kiu faris grandan laboron, ne nur pri Eroŝenko sed ankaŭ per tradukado de liaj ne tre konataj fabeloj



Esperantaj en la japanan.

Due, s-ro Tanaka Katsuhiko (foto **2**), lingvisto favora al Esperanto, esprimis impreson pri la ĵus prezentita balalajka muziko “Monto de Manĉurio”, kanto al li karmemora. Pri lia ĉefa temo “Ĉu Esperanto

vigliĝos poste?”, lia respondo estis jena: Esperanto ne havas patrolandon, neniu devige instruas kaj paroligas ĝin al popolo, pro tio esperantistoj devas esti tre bonaj, allogaj, kaj estimataj, kiel Eroŝenko. Tial ni mem fariĝu tiaj personoj.

Laste s-ino Sawachi Hisae (foto **3**), fama eseisto, prezentis interesajn epizodojn pri esperantistoj. Ŝi alte taksas Verdano Majon (japana nomo: s-ino Hasegawa Teru), kiu batalis kontraŭ japana armeo, kiam okazis agresa milito en Ĉinio. S-ino Sawachi diris, ke nun ni devas batali kontraŭ la reĝimo de Abe, kiu celas nuligi la 9an artikolon de nia valora konstitucio.



La Jar-kajero de NPO Esperanto Jokohama en 2015

Nia rondo, kun pluraj lernoklasoj, havas preskaŭ ĉiumonate "Hama-Rondan Vesperon" (HV), en kiu oni aŭskultas prelegon de membroj aŭ gastoj. Ni listigas HV kaj kelkajn aliajn eventojn.

(Mallongigo por la kunvenejoj)

[KK]: nia Kutima Kunvenejo, nome Gubernia Kunven-Centro [Kanagawa Kenmin Sentaa]

[PL]: nia vica kunvenejo, nome Placo de Kanagawa por Tergloba Civitaneco [Kanagawa Earth Plaza]

*jan. 25 [PL] Jarkunveno de la rondo por buĝeto, planado, estraro ktp. Ĉeestis 18 personoj kaj estis 36 mandatoj. Oni decidis dissolvi Jokohaman Esperanto-Rondon, kiam Ne-Profitolcela Organizo oficiale naskiĝis.

*feb. 8 [ĉambro en la domo de JICA] Kadre de Jokohama Internacia Forumo, nia rondo havis prelegon de Miyazaki Hideko kaj Fuse Kentarou.

*feb. 21 [KK] Hama-Ronda Vespero: pri Lillo, la kongresurbo de la 100-a Universala Kongreso, de franco Christian Couvez. Ni revidis lin julie en Lillo.



*mar. 7, 8 [KK] Ekspozicio ĉe Foiro de civitanaj agadoj, de la grupoj, kiuj uzas KK kiel kunsidejon.

*mar. 14 [KK] 98-a Legokunsido pri "Lumo kaj Ombro"

*mar. 21 [KK] Hama-Ronda Vespero: kun s-ino Audibert Kazue, japanino loĝanta en Francio.

*apr. 21 [KK] Hama-Ronda Vespero: pri la kampanjo "Montevideo 60". Fuse Kentarou, Sibayama Zyun'iti kaj Glauco Pompilio parolis.



*apr. 23: Oficiale fondiĝis Ne-Profitolcela Organizo Esperanto Jokohama .

*maj. 16 [KK] Hama-Ronda Vespero: pri la ĝemelaj urboj de Jokohamo. Ni revuis nian interkonatiĝon kun Esperanto-Rondoj en Liono (Francio) kaj Odeso (Ukrainio).

*jun. 6 [KK] 99-a Legokunsido pri "Modernaj Robinzonoj"

*jun. 20 [KK] 1-a Ĝenerala Kunsido de la NPO. Ni

konfirmis la planon de 2015 kaj la reg-sistemon. Ni ankaŭ aŭskultis klarigon pri NPO nomata CESLA helpanta la infanojn en Haitio, de s-ino Takaoka Miĉiko, ties prezidanto kaj nia membro.

*jul. 25 [KK] Speciala konversacia kurso, gvidita de s-ro Wajik Iwanicki.

*jul. 25 [Lillo] Ĉe Movada Foiro en la 100-a UK, ni prezentis nian rondon antaŭ la kongresanoj.

*aŭg. 30 [PL] Faka prelego de s-ino Heidi Goes (belgo), pri "Kvanteca kaj spaca analizaj studoj de mikro-variado en la konga lingvaro".

*sept. 2 [KK] 100-a Legokunsido pri "Padma, la eta dancistino"

*sept. 5 kaj 6 [KK] Foto-Ekspozicio: pri Esperanto, konatiĝo al la mondo pere de Esperanto.

*sept. 5 [KK] Rakonto pri spertoj: El 9 spertoj, 7 rilatis al Esperanto.

*okt. 3 [KK] Ges-roj Yoshie kaj Dieter Kleemann havis unu-horan prelegeton, i.a. pri germana E-movado.



*okt. 11,12 [Parko Zoo-no-hana] En la Internacia Festeno de Jokohamo, ni havis ekspozicion.

*okt. 11,12,13 [Urbo Sendai] Okaze de la 102-a Japana Esperanto-Kongreso, nia rondo havis standon.

*nov. 21 [PL] Hama-Ronda Vespero: pri Unesko. Gastis s-ino Takayama Chieri kaj klarigis pri la NGO-agadoj de Unesko, dum Suzuki Keiichiro preparolis la rilaton de Esperanto kaj Unesko.

*dec. 5 [KK] 101-a Legokunsido pri "Kredu min, sinjorino!"

*dec. 6 [Urbo Huzisawa] la 45-a Zamenhof-Festo de Kanagawa. Gastparolis s-ro Hori Jasuo.

*dec. 19 [ĉinstila restoracio Fukuyoken] Jarfina Festeno

Eesperanto, internacia lingvo,
kiu ligas homojn en la mondo.



desegnita de s-ino Miyazaki Hideko

Ĉina legendo

La alfluginta montokresto

Ji Yingeng

Laŭ legendo sur la monto Emei de Siĉuan-provinco iam ekzistis flugipova montokresto. Ĝi flugis jen orienten jen okcidenten. Kien ĝi alflugis, tie multe da domoj estis premdisfaligitaj kaj multe da homoj premmortigitaj. Tiam estis bonzo en la templo Lingyin apud la Okcidenta Lago en la urbo Hangzhou. Li tutajn tagojn kondukis kiel frenezulo kaj ne observis la disciplinojn de la templo, sekve ĉiuj nomis lin freneza bonzo. Iun tagon li eksciis ke en la tagmezo tiu stranga montokresto alflugos sur la vilaĝon antaŭ la templo Lingyin. Li timis ke la monto falos kaj mortigos multe da homoj. Li ellitiĝis antaŭ la tagiĝo kaj enkuris en la vilaĝon kaj diris al la familioj unu post alia.

“En la tagmezo unu monto alflugos sur la vilaĝon. Vi ĉiuj rapide transloĝiĝu, alie vi ne havos tempon rifuĝi!”

Aŭdinte lin la olduloj kapneadis.

“Freneza bonzo, vi ankoraŭfoje venis ŝerci. Montoj estas plej pezaj. Kiu vidis flugipovan monton?”

Kaj la kamparanoj suspirinte diris: “Kien ni, malriĉaj luantoj, transloĝiĝu? Se vere falos montokresto kaj ni estos premmortigitaj, ni nur povos riproĉi nian propran destinon!”

Dume la fraŭloj ridante diris: “Ne timigu nin per mensogoj. Ni ŝultroportus la monton, se ĝi falus. Ni ne timas!”

La infanoj ridege kaj kriege sekvis lin farante gajan bruon.

La freneza bonzo eniris en domon, eliris el ĝi kaj iris al alia por informi la tutan vilaĝon kun cent dek familioj. Li parolis tiel, ke liaj lipoj rompiĝis kaj salivo sekiĝis, sed ankoraŭ neniu fidis lin kaj des pli neniu familio pretis transloĝiĝi.

La suno leviĝis pli kaj pli alten, la tagmezo baldaŭ alvenos, kaj la freneza bonzo tiel maltrankviliĝis, ke li rondiradis kaj rondiradis. Tiutempe li ekaŭdis la sonon de la korno “di di da, di di da”. Li haste kuris al la sono kaj jen li vidis, ke iu familio prenas bofilinon, paro da geamantoj faras al si edziĝan ceremonion, la novedzo kaj novedzino kultas al la ĉielo kaj la tero! Ĝojo regas la domon. Oni okupitece en-kaj eliradas. Estas tre movoplene. La freneza bonzo gratante la kapon ekpensis kaj tuj forpuŝinte la amason atingis tien, kie okazis la ceremonio. Li subite surmetis la novedzinon sur sian ŝultron sen klarigo kaj elrabis ŝin el la domo kaj flugkuris ekstervilaĝen.

La ruĝa kufo sur la kapo de la novedzino ankoraŭ ne estis forprenita. Malkompreneme ŝi ne sciis kio okazas kaj timis tiel, ke ŝi kriadas kaj kriadas. La freneza bonzo eĉ rabis novedzinon; ĉu tion ĉi oni povis permesi? Oni ekprenis riglilojn, aŭ vektojn, sarkilojn aŭ rastilojn kaj postkuris lin tutkorpe. Postkurante

oni kriadis: “Kaptu la frenezan bonzon!”

“Rapide haltigu lin, ne lasu lin forkuri!”

Sekve la tuta vilaĝo ekbruis. Ĉu parencoj aŭ ne, ĉu amikoj aŭ ne, viroj kaj virinoj, olduloj kaj junuloj, ĉiuj elkuris el la tuta vilaĝo. Nur unu bienula familio en la oriento de la vilaĝo ne movis sin. Starante antaŭ la pordo kaj rigardante la bruon la bienulo diris sarkasme: “Monaĥo rabas novedzinon. Tio ĉi estas ja vera freŝaĵo, ha ha!”

La freneza bonzo senĉese kuris antaŭen portante la novedzinon surdorse. Kiel rapide li kuris! Oni postkuris lin jam por pli ol dekelkaj lioj, sed ankoraŭ ne povis lin kapti. La suno pendis super la kapoj, kiam la freneza bonzo haltis kaj ne plu kuris. Li demetis la novedzinon de sur la dorso, sidiĝis sur la grundon kaj ekventumis. Oni alkuris al li, kaj apenaŭ ili povis lin kapti kaj bati, neatendite palpebrume eknigriĝis tiel ke oni nenion vidis kaj la ventego ekmuĝis. Abrupte soniĝis “hong long!”. Ĉiuj estis tiel skuitaj, ke ili falis sur la teron. Kiam ili levis sin, ili vidis, ke jam la ventego haltis kaj la nubo disiĝis, la suno ree brilas, super la kapoj kaj unu montokresto ĝuste premas la vilaĝon.

Tiutempe oni ekkomprenis, ke la freneza bonzo rabis la novedzinon nur por savi la vivon de la vilaĝanoj.

La vilaĝo estas premata sub la montokresto kaj ĉiuj perdis la domon por reveni. Iuj vilaĝanoj tiel maltrankviliĝis, ke ili batadis sian buston, stampadis siajn piedojn kaj ekploregis. La freneza bonzo diris al ili: “Pro kio vi ploras! Vi ne scias ke la bienulo en la vilaĝo jam estis premmortigita sub la montokresto. Estonte vi kulturos vian propran teron kaj neniu devigos vin pagi terenton. Ĉu vi ankoraŭ timas ke vi ne povas konstrui novan domon?”

Aŭdinte tion oni ekĝojis. Ili tuj volis disiri, sed la freneza bonzo ree diris: “Ne foriru, ne foriru, ĉiuj aŭskultu min. La montokresto povis alflugi ĉi tien, do ĝi povos forflugi de ĉi tie. Kiam ĝi flugos aliloken, ree multe da domoj estos premdisfalitaj kaj multe da homoj estos premdortigitaj. Se ni ĉizos kvincent ŝtonajn arhatojn sur la montokresto, ni povos restigi ĝin ĉi tie eterne kaj ne lasi ĝin ree forflugi aliloken por premdortigi homojn kaj premdisfaligi domojn. Ĉu bone?”

Aŭdinte, ĉiuj ĥore esprimis sian konsenton kaj tuj komencis labori. Iuj martelis, aliaj ĉizis. Ili okupiĝis la tutan nokton. La kvincent ŝtonaj arhatoj estis finĉizitaj. Sur kaj sub la

montokresto pleniĝas ŝtonniĉoj kun budhaj statoj. Sed ili nur ĉizis la korpojn de la arhatoj kaj ne havis tempon ĉizi iliajn brovojn kaj okulojn. La freneza bonzo diris: “Mi havas metodon. Mi faru!” Li uzis nek martelon, nek ĉizilon, sed nur sian longan ungon por gravuri sur la vizaĝoj de la ŝtonaj arhatoj.

En la tagmezo li komplete finfiksas la brovojn kaj okulojn al la kvincent ŝtonaj arhatoj. De tiam tiu ĉi montokresto nenien povas forflugi kaj eterne restas antaŭ la templo Lingyin. Ĉar ĝi alflugis de aliloke, oni nomas ĝin alfluginta montokresto.

(rimarko) lio: ĉina distanc-unuo, ĉirkaŭ 1/2 km

(Noto: s-ro Ji Yingeng estas esperantisto en Ŝanhajo, amiko de ges-roj Sibayama)



NIAJ PLANOJ

*jan. 31 [KK] 2-a Ĝenerala Kunsido de la NPO

*feb. 7 [ĉambro en la domo de JICA] Kadre de Jokohama Internacia Forumo, nia rondo havos prelegon de Miyazaki Hideko, Fuse Kentarou kaj Nanba Fumiharu pri Esperanto.

*feb. 20 [KK] Hama-Ronda Vespero

*mar. 5 [KK] 102-a Legokunsido pri “Mara stelo”.

Niaj Klasoj kaj Kursoj

Okazas jenaj klasoj (ĝenerale en Kanagaŭa-Kenmin Sentaa)

*Regulaj Klasoj en sabato:

(1) Klaso por legado de “Hispana, Kataluna, Mangada...” finita. Poste oni legas la paroladon de Zamenhof en la 1-a UK (1905)./(2) Jokohama Salono. 2 fojojn oni legas el libro: “Vizaĝoj” / (3) Daŭriga kurso 2, lernado per “Hanako” / (4) Daŭriga kurso 1, tagoj nefiksitaj, lernado per “Hanako”

*Regulaj Klasoj en merkredo:

(1) Oni legas “La Zamenhof-Strato” de Roman Dobrzyński./ (2) Daŭriga kurso; legata libro estas “Karlo”.